


Jen Bulteno/64



dicembre

ĈEFARTIKOLO

Ni decidis, post multe da studado, ke la nuntempa esperantist-
junularo estas, efektive, MALLABOREMA! aŭ almenaŭ treege mal-
rapidema.

Eble ekzistas kialoj de tiu malrapideco; certe nia komunikado
estas tre malklara kaj malrapida. La nuna junulo preferas ne rapi
pri esperantaj aferoj. Notu ĉi tiun gazeton, ekzemple. Konstatu
ke ĝi ne venis al via hejmo dum la tuta somero aŭ aŭtuno. Nun ĝi
venas amase. Nun venas flue la gazeto, sed antaŭ-nelonge, oni eĉ
ne povus konstati ke ekzistas en nia lando ia Esperanto-junularo.
Sed ne estas nur JEN: ŝajnas ke la tuta usona esperantistaro est
mallaborema - eĉ la oldularo!

Konstatu ke estas nia idealo venki la mondon per nia
Esperanto. Estas memevidente ke ni finfine atingos tiun
ĉi celon, sed ju pli rapide, des pli bone, ĉu ne? Kaj
laŭ nia nuna rapideco, la tuta mondo kaj kredos nian idealon, kaj
parolos la lingvon, ne pli frue ol 2095 (plus-minus kelkaj
jaroj)!

Io certe estas farenda. Sed kio, efektive? 1-e, ni devas
certigi la publikigon de informoj je regulaj tempospacoj. 2-e
kaj pli grave, kiam iu el ni vokiĝos fari ian laboron esperantan,
ni faru ĝin tujtute, kaj ne prokrastu ĝin ĝis ni estos je humoro
ĝin fari. Ni laboru laŭ tiu ĉi celo!

* * * * *

(Ni ŝatus aŭdi alies ideojn pri ĉi tiu temo. Oni povas skribi
al: Esperanto-Klubo de Pioneer Valley, 4 Central Street,
Millers Falls, Mass. Usono.)

RAKONTO de KRISTNASKO

tradukita de "l'oldulino"

Infano Estas Naskita:

Kaj en tiuj tagoj eliris dekreto de Cezaro Aŭgŭsto, ke la tuta mondo estu registrita. Ĉi tiu estis la unua registrado, farita, kiam Kirenio estis reganto de Sirio. Kaj ĉiuj iris, por esti registritaj, ĉiuj al sia urbo. Kaj Josef ankaŭ supreniris el Galileo, el la urbo Nazaret, en Judujon, al la urbo de David, kiu estas nomata Betlehem, ĉar li estis el la domo kaj familio de David, por esti registrita kun sia fianĉino, Maria, kiu estis graveda.

Kaj dum ili estis tie, venis la tagoj por ŝia akuŝo. Kaj ŝi naskis sian unuan filon, kaj ŝi ĉirkaŭvindis lin kaj kuŝigis lin en staltrogon, ĉar ne estis loko por ili en la gastejo.

Kaj en tiu sama regiono estis paŝtistoj, kiuj kampoĝis kaj nokte gardis sian gregon. Kaj anĝelo de la Eternulo alstaris apud ili, kaj la gloro de la Eternulo brilis ĉirkaŭ ili, kaj ili timis per granda timo. Kaj la anĝelo diris al ili: Ne timu; ĉar jen mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo, kiu estos al la tuta popolo; ĉar hodiaŭ estas naskita por vi, en la urbo de David, Savanto, kiu estas Kristo, la Sinjoro. Kaj jen la signo por vi: vi trovos infaneton, ĉirkaŭvinditan kaj kuŝantan en staltrogo. Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭdante Dion, kaj dirante:

Gloro al Dio en la supera alto,

Kaj sur la tero paco, inter homoj Difavoro.

Ĉi tiuj bonkonataj versoj el la Evangelio laŭ Sankta Luko, estas la komenco de nia Rakonto de Kristnasko.

La multaj kutimoj, moroj, legendoj, kaj tradicioj devenantaj de la unua Kristnasko estas nenombreblaj. Diversaj popoloj kaj diversaj rasoj elektas malsimilajn manierojn por festi ĉi tiun plej belan el ĉiuj tagoj. Jen estas kelkaj tradicioj kiujn nia popolo ĝuas...

Tradicio Estas Naskita:

La spirito de donado elstaras inter la tradicioj de Usono. Kiel ekscita estas la spektaklo de la multkoloraj pakaĵoj kun brilaj bantoj, la novaj ludiloj, kaj la pufaj ŝtrumpoj, ĉe la kameno Kristnaskmatene! En multaj landoj la donado ne ĉiam okazas dum Kristnasktago. Iuj elektas la sesan tagon de Decembro, kaj iuj aliaj la dekduan tagon post Kristnasko, tiam kiam la Saĝaj Viroj vizitis la Kristinfanon kaj donis al Li oron, olibanon, kaj mirhon. Multaj aŭtoritatuloj pruvis, ke nia nuntempa Kristnasko, venante en Decembro similas al paganaj festtagoj de donado.

La tradicio de donado inter la Romanoj okazis je la Nova Jaro. Oni kredas, ke pli signifa fonto ol paganaj ritoj estigis nian tradicion de donado. En Eŭropo la unuaj Kristanoj interŝanĝis Kristnaskodonacojn. Kaj eble, la Kristnasko-donado rememorigas al ni la unuan, kaj plej indan donacon iam al homoj donitan. Pri ĉi tiu donaco Sankta Johano skribis: Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidus al Li, ne pereu, sed havu eternan vivon.

Legendo estas naskita:

En nian modernan Kristnaskon venas Santa Klaŭs, la portisto de donacoj. La gaja, ronda, maljuna sanktulo apartenas al nia Kristnasko, kiel la steloj apartenas al nia standardo.

Dum la unua parto de la kvara centjaro, en Malgrand-Azio vivis viro, konata pro bonkoreco kaj malavareco. Li iĝis Episkopo de Myra. Ĉi tiu viro estis Sankta Nikolao. Post la morto, li preskaŭ iĝis legendo de boneco kaj helpemeco en Kristana Historio. Li estis patrono de Grekujo, malnova Rusujo, kaj multaj aliaj landoj. Ĉar la festtago de Sankta Nikolao venas dum la Kristnasko sezono, oni diris, ke la patrono donis Kristnasko-donacojn. Nederlandanoj prezentis Sanktan Nikolaon al Usonanoj, kaj tuj, ni nomis lin Santa Klaŭs. Aŭdinta la legendon, Clement C. Moore, en Novjorko, verkis por siaj infanoj la poemon "Vizito de Sankta Nikolao". Dum la sekvanta jaro, 1823, la poemo aperis en Novjorka ĵurnalo. Post nelonge, tra la tuta mondo infanoj estis aŭdantaj la poemon pri Santa Klaŭs. Kvan-kam S-ro Moore estis klerulo de la klasikaj lingvoj, tamen li kreis la legendan figuron Santa Klaŭs, bone konata kaj amata ĉe geknaboj.

Kiel la bona sanktulo havigis al si nordajn cervojn? Devas esti, ke bonkora laplandano donis sian solan veturilon (tiamtempe, nordaj cervoj estis la sola rimedo por veturi en Laplando) al Sankta Nikolao por ke li povu veturi rapide de Malgrand-Azio al Nederlando kaj Usono. La cervoj tiel rapide veturas ke gaja Santa Klaŭs baldaŭ vizitos ĉiujn geknabojn en la mondo.

Moro estas naskita:

Kiam gaja Sankta Nikolao venas en niajn salonojn li trovas ilekson, viskon, kaj aliajn kutimajn dekoraciojn. En la angulo staras Kristnaskarbo, lumoplena kaj vigla per brilaĵoj, lumoj, kaj multaj ornamaĵoj. Kial ni starigas arbon en nia salono? Nu, dum la Usona Revolucio en la jaro 1776, kelkaj germanaj soldatoj enkondukis la moron al Usono. En la jaro 1804 Kristnaskarbo estis parto de la Kristnaskfesto ĉe Fort Dearborn, kie nun staras Chicago. Nuntempe la Kristnaskarbo staras en preskaŭ ĉiuj usonaj hejmoj.

Tamen la moro montris sin eĉ dum paganaj tagoj en norda Eŭropo. Dum la mezvintraj tagoj la paganulo portis ĉiam verdaĵon, ilekson, kaj viskon, en sian hejmon. Tion li faris por provizi havenon por ke amikaj elfoj ankaŭ povu partopreni la feston. La eŭropaj kristanoj tiom ŝatis la koloron kaj odoron de la freŝa ĉiamverdaĵo, ke ili daŭrigis la moron.

Unu legendo asertas, ke la unua arbo kun lumoj kaj dekoracioj apartenis al Martin Luther. Li volis kapti la belecon de la stel-lumaj ĉiamverdaĵoj, videblaj en la gloro de neĝa Kristnasknokto, tie en Germanujo dum la komenco de la dekseca centjaro. Ek de tiam la moro allogis multajn anojn el diversaj partoj de Germanujo.

La simbolo de senmorteco estas facile videbla en la helaj ĉiamverdaĵoj kiuj travivas malvarmegaj vintroj, ankoraŭ tenante la freŝan verdan koloron.

Rakonto estas naskita:

Rakonto pri Dia reaĉeto kaj novtrovita feliĉeco ankaŭ apartenas al nia Kristnasko. Ĉiujare en Decembro ni legas kaj

relegas la rakonton de Scrooge kaj la tri fantomoj. Per radio kaj televido venas novaj formoj de la malnova rakonto.

Charles Dickens verkis la fabelon "Kristnaska Rakonto" en la jaro 1843. Tuj ĝi sukcesis, kaj tradukaĵoj en multajn lingvojn aperis tra la tuta mondo. Dickens verkis multajn Kristnaskrakontojn, sed neniu el ili tiel sukcesis kiel la fabelo pri la avarulo kiu lernis amzorgi Kristnaskon.

Kanto estas naskita:

Se ne estus Kristnaskmuziko kaj ĝojkantoj, al ni estus perdita la spirito de Kristnasko. Portante esperon kaj pacon, ĝojkantoj milde tuŝas la homan koron.

"Kaj sabite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭdante Dion kaj dirante:

Gloro al Dio en la supera alto, Kaj sur la tero, paco, inter homoj Difavoro."

Komencante ĉe la unua ĝojkanto, ĉiu popolo, kaj ĉiu lando kontribuis Kristnaskmuzikon. Pasante laŭbuŝe, de generacio al generacio, tradiciaj popolkantoj kuniĝis kun Kristnaskkantoj verkitaĵoj de Martin Luther, Charles Wesley, Isaac Watts, kaj Phillips Brooks. La muziko de Felix Mendelssohn, Friedrich Handel, kaj Franz Gruber beligas eĉ pli la kreaĵojn de tiuj verkistoj.

Ŝajnas, ke la plej favorata Kristnask-kanto estas "Silenta Nokto". Franz Gruber, kiu ludis la orgenon, kaj Patro Joseph Mohr, kiu pastris en malgranda preĝejo en Arnsdorf, Aŭstrio, komponis la kanton. Iun tagon antaŭ Kristnasko la du bonaj viroj trovis la orgenon rompita. Mankis al ili la taŭga muziko por Kristnaska Diservo; tial Patro Joseph skribis poemeton kaj Franz Gruber komponis la muzikon. Kristnaskmatene dum la orgenisto ludis gitaron, la bona pastro unufoje kantis la belan himnon. Trankvileco kaj paco ripozas en la koro kiam oni aŭdas ĝin.

- - - - -

RASA APARTIGO

Dennis Banash

Nuntempe, nin okupas la tutmonda problemo de civilrajtoj kaj rasa apartigo. Por la negro, kaj kelkaj aliuloj kies haŭto hazarde ne estas blanka, ĉiuj privilegioj estas barataj.

Pli funde enrigardante tiun problemon, ni trovas ke ŝajnas esti la olduloj kiuj fine decidas pri apartigo. La pleja parto da la junularo de la hodiaŭa mondo feliĉus akcepti la negron. Konstatu ke Joe Lewis, Willie Mays kaj Jimmie Brown estas ĉiuj negroj, kaj ili certe ne "portas insektojn" kiel kelkaj homoj ja pensas pri nebone konataj nguruloj.

Sed, kiel normale, se iu lerta dekelkjarulo proponas sugeston, la olduloj tuj forĵetas ĝin dirante: "Frenezaj junuloj! Kion ili scias pri mondproblemoj? Ilia nura faro estas rajdi en aŭtomobilaĉoj, fumi, drinki, kaj farigi problemojn."

Nu, mi pensas ke kelkaj el tiuj ĉion sciantaj olduloj povus ion lerni de ni "frenezaj" gejunuloj.

La olduloj, en siaj senregagoj, batalas, eĉ murdas negrojn, kaj ilin baras de multaj publikaj ejoj. Tio ĉi en nia lando de libereco kaj abundeco por ĉiu! Ĉar ĉiu ĉi estas kreita egala -- estas nur ke iuj estas pli egalaj ol aliaj. Dum l'olduloj daŭras batali, la junularo interamikigas senrigarde, eĉ spite, de haŭtkoloro aŭ raso aŭ religio.

Ni rigardu pli funde en la problemon. Ni trovas grupon de veturantaj arlekenoj sur la korbobala tereno. Jen ekzemplo kie oni ridas je la ridindaĵoj de la "Harlem Globe Trotters", tute negra aro, ĉiuj el kiuj kreskis ĉe la "malbona flanko de la fervojo". Ĉi tiuj viroj portas kun si humoron kien ajn ili iras en la tutmondo.

Se tio ĉi estas malbona kaj barinda, mi do ĉi-citante ĵete fordonas ĉiujn miajn kontaktojn kun ĉi tiu mondo, ĉar se tio estas la vero, mi ne povus travivi la penson.

Do, karaj geamikaj olduloj, tian ĉi artikolon legu kaj proridu. Poste ĝin forkaŝu forĝese, dirante "frenezulo juna!" . . . sed memoru ke unu tagon ni frenezaj junuloj iĝos olduloj, kaj regos la mondon. Kaj memoru ke estas al vi geolduloj pretigi la stadion por ni. Se vi postlasos stadion el putraj tabuloj, do estos via kulpo se la stadio rompiĝos.

Ja ridu, kaj nomu nin frenezaj -- sed memoru kion diris ĉi tiu frenezulo!

PENSOJ PRI LA TAGO ANTAŬ LA NOVJARO

Justin Lapoint

La mondo vivas en espero dum la tago antaŭ la Novjaro. La Nova Jaro venas kiel infano kaj la mondo kvazaŭ patro miras pri sia infano. Tamen kun la ĝojo kaj ridetoj estas larmoj. Ĉar la gepatroj scias ke la infano trovos ne nur amon kaj ĝojon kaj verecon sed li konos ankaŭ malamon kaj doloron kaj dubon. Lia vizago juna, nun mola kaj glata, sulkiĝos pro aĝo kaj zorgado. Tamen la Nova Jaro alportas esperon al la koro de la homaro kaj vidigas al ĝi la mondon en lumo tutnova.

LA SKRIBVERKEMA TALENTO DE LA HODIA A JUNULARO

Josefo Chagnon

Dum multaj jaroj, la pli grava krea verkado estas farita de gemaljunuloj. Tre malmulte da vaste legata literaturo estis verkita de gejunuloj. Sed nun, oni aŭdas pli ofte pri junaj verkistoj, kiu facile enirigas sin en la mondon de l' moderna literaturo. Tre baldaŭ ni eble vidos dekelkjarulon kiu ricevos la Pulitzer-Premion. Kiu scias?

Kaj pri la enhavo de iliaj verkoj; eĉ ilia juneco provizos imagon. Kaj ilia venonta matureco provizos realismon.

Ĉi tiu realismo estas kvalito kiu devas ĉeesti, eĉ en la plej efikaj rakontoj, por doni al ĝi realan karakterecon kaj apartecon.

La junulo kiu decidas je verkado kiel kariero, devu antaŭvidi multe da penlaboro. Al tiu, oni nur povas diri - bonŝancon!

F L A S HLAST MINUTE NEWS FROM EIC...AS WE GO TO PRESS...

EICastro Bernard Stollman made taped appearance over New York City radio after midnight of January 14, (WOR RADIO). 50,000 signal directed at inland USA. Excellent 30 minute promo for ESP by "Amazing RANDI" who quizzed his own producer and secretary using the TEST YOURSELF leaflet, and made pitch for EID, offering info for 10¢ and return address envelope. Too early to tell results, but Monday A.M. will tell the story. More on this later...

Visit to Johnny Carson NBC network show by Bernard Stollman is present possibility, which would be greatly expedited if you would write to Johnny Carson, NBC Television, 30 Rockefeller Plaza New York City, and ask him why he doesn't mention Esperanto on his show. A few letters will bring a strong favorable reaction, so PLEASE WRITE.

Re: WOR RADIO appearance...Mrs. Newman of New York Society wrote to the station, and was invited to appear. She graciously turned the assignment over to BS...one letter brought us a strong 30 minute free commercial. Letters have power, great power, vastly beyond the little effort required to pen them...so please do it now

In response to recommendation from EIC, Mark Starr will probably be designated by ELNA PRESIDENT FRANCIS HELMUTH as our nominee for vital role of UEA delegate to the United Nations. John Lewine, president of New York Society was delegated by UEA to cover ECOSOC, but we have had no designation of a UEA representative to the UNO. UEAest D-ro Ivo Lapenna would confirm the appointment. S-ro Starr is the obvious choice for the position; as a charming, persuasive and long time Esperantist, he has carried similar responsibilities with great distinction.

EIC is greatly hampered in replying to ELNAantoj by lack of funds to employ even a part time stenographer. We must have staff of professional people to mount the most modest program that would warrant our present commitment of time and effort.

New York Society held its first meeting of 1965 in the ESP-DOMO. Attendance of over 40 members and guests, with entertainment that included the impromptu rendition of an Esperanto tango by a male duo, and guitar-accompanied solos of KARA KENTOKI-LAND and PASINT. TAGOJ. Pictures of the affair and of the Esperanto Domo will appear

(continued from F L A S H LAST MINUTE NEWS FROM EIC)

in the next(ESPERANTO DOMO) issue of the NEWSLETTER..

THE FORTHCOMING JAPANESE TOUR is the result of two years of persistent efforts by Mr. and Mrs. Joseph F. Edmiston of Portland, Oregon, who deserve the warm applause of all ELNA members.

MRS. SCHMIDT HAS JUST RECEIVED WORD from a priest in Italy who has contact with an intermediary at the VATICAN. He says that the POPE has agreed that if enough individuals, or group petitions, reach THE POPE, VATICAN CITY, ITALY, he will begin broadcasts in ESPERANTO this summer. *see page of Newsletter*

LA BERMUDA ESHERAMO-ASOCIO, Hamilton, Bermudo, sendis al la Sekretario de ELNA dankon por danki ĉiujn usonajn samideanojn, ĉar tiom da mesaĝoj alvenis el Usono, ke ni ne povas respondi al ĉiuj.

VOLAS KORESPONDI KUN USONANOJ POR INTERŜANĜI BILDKARTOJN PRI URBOJ TR LA MONDO:

F-ino Amalka Szdlackova - Kladska 112 - Nachod 5 - Balovas, Ĉeĥoslovakio

VOLAS KORESPONDI KUN USONANOJ:

Emilio Folgado Lopez - Str. Cardenas Cisneros 48, BADAJOS-Hispanio
Kolektas kaj interŝanĝas esperantaĵojn kaj poŝtmarkojn, deziras korespondi per poŝtkartoj.

Makoto Oya, Agia Savisu, Keizai Kiyoroku Centa, 42 Honmuracho, Ichigajā, Sinjiku, TOKYO, Japanio. Dudekjara, fotografio, poŝtmarko kinematografio, vojaĝado, muziko.

Huzisiro Kenzo - Izumi-mati 1 -11 - Kadoma-si, OSAKA-hu, Japanio.
32 jara komizo, intencas eldoni Esp-librojn; jam eldonis tri;
Lingvo-Stilo-Formo (Kalocsay), La Obstino de Nakazima, kaj alian.

ARANGAS GRANDSKALAN EKSPozICION (LA MONDO EN LA OKULOJ DE LA INFANJE) je junio 1a, 1965, en belaj salonegoj de malnovaj konstruaĵoj el la XVa jarcento sub la protekto de granda tagjurnalo WIECZOR WYBRZEZA (VESPERO DE LA MARBORDO). Sendu infandesegnaĵojn. Ĉiu ricevos respondebeto validas ĝis majo 1965. Adreso: Rondo de Junaj Esperantistoj, de Ŝtata Infandomo - GDANSK-9, Str. Brezegi 55, POLLANDO.

SE VI VIDIS LA BELEGAN FALDFOLION PRI LA AUTOMOBILO FIAT 850, bonvo sendi laŭdan leteron al la ITALA ESPERANTO FEDERACIO, kiu instigis la aferon. Tio kuraĝigos al FIAT eldoni similajn aliajn presaĵojn.

KRISTNASKO ĈIRKAŬ LA MONDO

Judy Lapenas

Ĉar Kristaneco etendiĝis tra Eŭropo kaj tra la mondo, Kristnasko festiĝas tutmonde kaj ĉiu lando aldonis specialajn posedaĵojn al la sezono. Permesu ke mi diru al vi pri kelkaj specialaĵoj kaj kutimoj:

En Francujo, la naskiĝa sceno estas la simbolo de Kristnasko. Dum antaŭvespero de Kristnasko, en ĉiu domo la familio ordigas la figuretojn de la sankta familio. La tri reĝoj estas metitaj plej malprosime de la Kristinfano. Ĉiun tagon la familio transigas la reĝojn pli apuden ĝis ili estas precize antaŭ la Kristinfano je 6 januaro, la Festo de la Reĝoj. Tiun nokton antaŭ ol la infanoj dormas, ili lasas siajn ŝuojn ekster la pordo por ke "Pere Noël" plenigu ilin per donacoj.

En Nederlando Sankta Nikolao venas la 6-an de decembro por lasi ludilojn kaj bombonojn pro la infanoj. Dum la antaŭvespero de Sankta Nikolao li mem venas portante belegan robon. Li portas betulan bastonon kaj se la infanoj estis bonaj, li laŭdas ilin, sed se ili estis malbonaj, li diras al iliaj gepatroj ke ili estu punataj. Ili lasas iliajn ŝuojn sur la tablo plenigitaj per fojno por la ĉevalo de Sankta Nikolao. Kristnaska tago estas festata pli malfrue en la monato per religiaj ritoj.

Por memori la humilan naskon de Kristo, la popolo de Polujo metas fojnon sur la tablon kiun ili uzas por sia granda Kristnaska festo. Ili ankaŭ havas malplenan seĝon ĉe la tablo por la vizito de la Kristinfano.

En Svedujo, la Kristnaska sezono komenciĝas je la 13-a de decembro. Ĉiuj junaj knabinoj ellitiĝas frue, vestas sin en longaj blankaj roboj, kronas siajn kapojn per pinaj branĉoj ornamitaj per lumigitaj kandeloj, kaj eliras por doni festajn kukojn al siaj geamikoj. Ĉie tra Germanujo, la infanoj dekoras Kristnaskajn arbojn, kaj estas Kavalira Ruperto, kiu donas donacojn. Bildoj de ĉi tiu bona sanktulo montras lin portantan sakon da ludiloj sur la dorso kaj portantan la Kristinfanon sur unu ŝultro.

En Meksikio, familioj ankaŭ uzas figurojn por pentri la naskiĝanscenon. Dum la Kristnaska Tago la infanoj ludas tre specialan ludon nomatan "Pinato". Gaje ornamita fajenca urno kiu estas pleniĝita per multaj bombonoj kaj donacoj, pendas de la plafono. Ĉiu infano estas "blindigita" per tuko kaj ricevas branĉon per kiu li penas rompi la urnon. Fine, post kiam unu infano rompis ĝin, ĉiuj kuras por ĝiaj enhavaĵoj.

Sed, eble la infanoj de Usono estas la plej bonŝancaj ĉar Usono estis koloniigita de tre multaj landoj; ili havas kutimojn de ĉiuj landoj kaj farigis ilin tradicio. Ili ornamas Kristnaskajn arbojn kaj ili kutime havas la naskiĝanscenon. Ili kantas Kristnaskajn ĝojkantojn de la maljuna mondo kaj ili eĉ havas "personon" de Kristnasko. Li estas "Santa Claus". Li venas Kristnaskan antaŭvesperon kaj alportas dolĉaĵojn kaj ludilojn al ĉiuj bonaj geknaboj.

Do, kiel ajn ĝi estos, havu ĝojan Kristnask-feston!!!

SKLAV-AŬKCIOJ NUNTEMPAJ

George Mount

Antaŭ kelkaj semajnoj, ĉe kunveno de nia preĝeja junulgrupo, ni serĉis kielon gajni monon por nia kaso. Fine ni decidis ke dum venonta preĝeja tagmanĝo, ni subtenos sklav-aŭkcion. Kompreneble, ĉi tiuj ne estas samaj kiel tiuj de la tempo de juneco de Abe Lincoln, ĉe kiuj nigruloj estis vendataj je kelkaj dolaroj por ties tuta vivo, al blankuloj, sed la gejunuloj el la grupo estas vendataj aŭkcie. Por kiu ajn kiu aĉetas lin, la junulo faras malpenan laboron, ekz. purigi automobilejon aŭ lavi aŭton aŭ forrasti foliojn. La knabinoj bezorgas dum la nombro da horoj por kiuj ŝi sin vendis (malofte plias 2-3 horojn).

Kiam oni "aĉetas" dekkelkjarul/in/on, oni ricevas paperfoliojn, sur kiuj estas skribataj: la nomon, adreson, kaj telefonnumeron de la "sklavo". Kelkaj la gejunuloj laboras la proksiman tagon, aliaj atendas kelkajn semajnojn, kaj kelkaj eĉ neniam vokiĝas!

PRO KATO

Beverly Grace

Antaŭ kelkaj jaroj mi havis la duban honoron kuraci nian katon je ŝia unua idaro.

Mi ĉiam memoros la tagon - estis la kvina dum "varmecondo" en julio kaj la temperaturo estis ĉe 98 gradoj (Fahrenheit). Mi ĵus finis manĝi kaj panjo kaj mi estis diskutantaj la veteron kiam Smokey, nia favorata kato, saltis sur miajn genuojn kaj sciigis al mi pri pli urĝaj problemoj: Nenecezas diri ke pasis nenioda tempo antaŭ ol ni konstatis kio estas okazonta.

Panjo kaj mi portis la katinon al speciala skatolo (kiu estis jam preparita pro ĉi tia okazo).

Baldaŭ ni estis la fieraj posedantoj de unu bela trikolora katino kaj ŝiaj ok miniaturaj katidoj. Ĉiuj ŝajnis esti sanaj sed mi notis ke la patrino puŝadas unu idon for de la ceteraj. Estante normale scivolema, mi paŝis tien por eltrovi la problemon.

Mi estis avertita ke mi devu ne levi la katidojn nek resti proksime de la nesto, ĉar la panjo, timante pro siaj idoj prenis ilin en sia buŝo al sekreta kaŝejo. Jetante avertecon al la ventoj, mi levis la etan neakceptatan katidon, kaj, je proksima ekzameno, mi trovis ke li havas preskaŭ nenion da felo sur la korpo. Li ŝajnis havi grandan malfacilon je spirado. Mi per pura, blanka poŝtuko lin ĉirkaŭvolvis, kaj lin tenante en mia mano delikate, penis nutri lin per iom da lakto el okultubo.

Mi donis al li du gutojn, kaj terurege mi vidis ke li ne povas teni la nutraĵon ĉar estas truo en lia gorgo kaj alia ĉe lia stomako. Necesis urĝi. Mi metis la katidon en lanan ŝtrumpeton kaj tuj lin portis al bestkuracisto. Li konsilis al mi ke estus probable des pli bone se mi ne ĝenus "la laboron de l'naturo". Li diris ke eĉ se la kato vivus, ĝi eble estus kripl^a.

Sed mia menso kaj koro estis decidintaj kaj mia nura penso por la sekvantaj semajnoj estis "ŝparu tiun katidon". Pro mia insisto, la doktoro donis al mi medikamenton kiu helpus fermi la truojn kaj ankaŭ donis iom da interna kuracaĵo. Pasis 4 tagoj da senĉesa prizorgo por ke la katido estu preter danĝero. Lia progreso estis malrapida sed certa; felo komencis kreski ĉe lia korpo. Li komencis gajni pezon kaj povi manĝi.

En matureco li estis bela kato. La koloro de lia felo estis ne normala. Li estis plej parte ruĝa - sed estis pale mielruĝa. Liaj okuloj estis brunaj.

Li estis konstante mia "ombro" kiam mi estis hejme. Li manĝis nur kiam mi manĝas kaj dormis sur mia lito. Negrave kion mi devis fari en la domo, Fru-fru (lia nomo) volis min helpi. Kiam mi sidis en la salono legante aŭ farante manfaritaĵon, li sidus ĉiam sur miaj genuoj kaj ronronus kiel maŝin-boato. Neniam mi devis lin serĉi, li ĉiam atendis min kiam mi hejmenvenis.

Estis unu Kristnasko kiun bone mi memoras: mi estis ornamanta la arbon, kaj la kato saltis sur seĝon kaj trovis la malfermitajn skatolojn da ornampilketoj. Li komencis ludi kun ili per la piedoj. Li bele amuziĝis ĝis unu kaptiĝis en liaj ungoj kaj ne forĵetebilis. Li pete rigardis min kaj mi deprenis la pilketon.

Paĝojn mi povus skribi pri Fru-fru kaj liaj arlekenaĵoj li estis lumaja en mia vivo du jarojn. Sed li ŝajnis velki, kaj nenion mi povis fari por lin helpi . . . Nun mi ĉiam sentos la foreston de Fru-fru.

- - - - -

Knabeto: "Kial fiŝoj ne parolas?"

Panjo: "Nu, ĉu vi povus paroli sub akvo?"

- - - - -

AL VI, MARIA

Milde flustris la anĝeloj
Nomon de l'Maria Sankta.
Kaj ventetoj ĝoje laŭdis
Nomon de knabino juda.

Sur la maro ŝipo portis
Al la nekonata lando
Belan nomon, sanktan nomon,
Nomon de judknabino.

Ĉie en la tuta mondo
Inaj lipoj milde flustras
Nomon de knabino juda,
Nomon de l'Maria Sankta.

)

- - - - -

KRAJOGENIKO

Arthur Morse

En la sciencan mondon estas veninta nova fako. Tiu ĉi estas la studo de malalt-temperatura fiziko, aŭ t. n. krajogeniko. Ĝi estas nova speco de studo, kaj tial mi uzos ĉi tiun paĝon por provi interesi vin pri la ja interesa temo.

Oni konsideras temperaturojn malpli ol -100 gradojn* krajogenikaj temperaturōj. Je ĉi tiuj temperaturoj, ordinaraĵ substancoj prenas al si strangajn proprajōjn. Ni unue konsideru la gason heliumo, ĉar ĝi havas je krajogenikaj temperaturoj la plej strangajn proprajōjn.

Ĉiuj substancoj estas solidigitaj ja la temperaturo de -289 gradoj, kun la escepto de heliumo. Scienco ne estas trovinta ian manieron malpliigi temperaturon ĝis zero absoluta, kaj tial ne scias kio okazus je tiu gaso tiam, sed sciencistoj ja povas atingi temperaturojn nur kelkajn dekonojn super ĝi, kaj ankoraŭ heliumo nenion plian faras krom fluidiĝi. Je krajogenikaj temperaturoj, heliumo montras karakterizojn tiel aliajn ol gasa heliumo ke oni donas al ĝi specialan nomon - heliumo II. La plej grava malsamo estas ke heliumo II havas tute nenian frotadon! Efektive ĝi ŝajnas ankaŭ neniel influigi eĉ pro graviteco. Ĝi povas flui dekliven. Tiu ĉi aspekto de heliumo II nomiĝas "superflueco". Specialaj ujoj devas esti konstruitaj por enteni ĝin, ĉar ĝia ignoremeco povigas ĝin traflui porajn metalojn. Ankoraŭ alia efiko de krajogenikaj temperaturoj sin montras en certaj metaloj. Ni ĉi tie uzu ekzemple la metalon plumbo. Je proksimume 2 gradoj laŭ la Kelvin-skalo, ĉi tiu normale havas fortan elektran rezistancon. Antaŭ ol mi diru ion pli, mi klarigos la kialon por tiu ĉi rezistanco.

Ĉiu scias ke ĉiu substanco estas el atomoj kaj iliaj kuniĝaĵoj, molekuloj. Ĉiu molekulo vibras je konstanta rapideco. Tiu rapideco nomiĝas Plank'a konstanto. Ĉi tiuj vibrantaj molekuloj frapas la trapasantajn elektronojn de elektro: tial rezistanco.

Nun; je krajogenikaj temperaturoj, kiel mi jam diris, plumbó montras nenian rezistancon al elektra kurento. Sciencistoj divenis ke je malaltaj temperaturoj la Plank-a konstanto malpliigas. Sekvante tiun hipotezon plue, estas normale pensi ke, profakte ke la substanceroj malplie vibras (aŭ eĉ tute ne vibras), estos malpia, aŭ nenia rezistanco. Efektive, estas pruvite ke la rezistanco nuligas. Profesoro ĉe la Massachusetts-Instituto de Teknologio enigis elektran kurenton en ringon el malvarmega plumbo, kaj post iom pli ol du jaroj, li mezuris la kurenton restantan en la ringo, kaj trovis ke estis tute nenia malfortigo!

Estas aliaj interesaĵoj en la studo de krajogeniko, sed mi ne deziras enuigi la leganton, kaj ĉi tiu bulteno ne estas, efektive, scienca gazeto!

* temperaturoj donataj estas laŭ Centgrado escepte kie dirate alie.

Serĉinte longan tempon, Ges-roj Brown fine trovis hotelon. Post registrado, ili rapide enlitigis. Tuj S-ino Brown elsaltis el la lito kaj telefonis. "Ĉu vi estas la posedanto de ĉi tiu hotelo," ŝi demandis la respondanton.

"Mi estas" viro diris, "Kio estas manĝanta vin"

"Tio," indigne respondis S-ino Brown, "estas ĝuste kion mi volas scii"

Junuloj rajdante en auto:

"Ne tiel rapidu! Vi min mortigos!"

"Nu, oni povas morti nur unufoje."

"Ĉu vi kredas, ke tio ne sufiĉas?"

VINTRO

Jennie Mount

Per vintro venas la plej bela sezono de la jaro. La malvarma, krispa aero, la pensoj pri la unua neĝfaligo de l'jaro, la feria spirito en la aero igas onin paŝi vigle survoje.

L'unua neĝfalo estas ĉiam bonvena vidaĵo. Ĝi venas kovri kiel lankovrilo la brunojn de la aŭtuno, kvazaŭ protektante la grundon ĝis la unuaj verdoj de la printempo sin montros.

La vento kirlas la neĝon en altaĵetojn de molo havantajn formojn kiuj eklaborigas la imagon, same kiel la vido de nubformoj. La freŝaj piedpaŝoj en la nove falinta neĝo aspektas kiel io trovata en nova lando.

Familiaraj vidaĵoj prenas al si novan aspekton kiam ili estas kovritaj kaj ĉirkaŭitaj per neĝo. L'aŭtoj veturas malrapide, kvazaŭ paŝi malpeze sur la neĝo.

Gejunuloj konstruas la unuan neĝviron de la jaro, kaj depruntas ĉapojn kaj skarpojn por lin vestumi. Kaj kiam la neĝo igas malbela pro fumoj el aŭtoj kaj kamenoj, venas nova neĝfalo, kaj ĉio estas denove bela.

Mi ĉiam miras je la maniero kiel la neĝo balancas sur eĉ la plej etaj branĉoj ĝis ili klinas sin al la tero.

Dume la sezono daŭras, kaj mi devas pretigi por la gejunuloj. Devas pretigi - gantojn, botojn, varman vestaĵon, dikajn ŝtrumpetojn, skarpojn, ĉapojn. Ĉiam mi aŭdas "Hej, funkciigu la fornon!" Aĥ, mi scivolas kiom baldaŭ ĉi tiu aĉa sezono finiĝos!!

- - - - -

Edzo: "Karulino, Ĉu vi ne estas iom malŝparema? Vi funkciigas viajn elektrajn ventumilojn dum la tuta tago."

Edzino: "Ne ĉagreniĝu, kara. Ili ne estas la niaj. Mi depruntis ilin de la najbaro."

- - - - -